

Hans Christian Andersen,
 Infanrimaĵo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Pupo mia, dancu vi!
 Kiel bela estas ĝi,
 la fraŭlin'! Kaj ankaŭ la
 kavalir' aspektas ja
 en la blua frako tre
 elegante, aŭ ĉu ne?
 Estas belaj li kaj ŝi.
 Pupo mia, dancu vi!

Jen la pup' de l' lasta jar',
 kun la flava kapharar'!
 Estas ĝi la Lizinet',
 la malnova lud-pupet'.
 Venu, olda amikin',
 mi nun volas lavi vin.
 Vi nun dancu ĉiuj tri!
 Rigardindas tio ĉi!

Dancu, mia pupo kun
 la aliaj pupoj nun!
 Paŝo flanken, unu klin'!
 Ĉiam tenu rekte vin!
 Vi turniĝu kiel rad',
 tre sanigas la dancad'!
 Plaĉas tio ĉi, ĉar vi
 estas ĉarmaj ĉiuj tri.

*Traduko de la Dana poemo "Et børnerim" de HANS CHRISTIAN ANDERSEN (Johano Kristiano Andersen', *1805-04-02 – †1875-08-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1991-08.*

MR-248-1 / Arg-246-497 (2005-04-22 19:40:53)